

# Estrara Raporto pri la agado de UEA en 2018

**La Estraro de UEA en majo 2019:**

- Mark Fettes (Prezidanto)
- Stefan MacGill (Vic-Prezidanto)
- Aleks Kadar (Ĝenerala Sekretario)
- Lee Jung-kee
- Emilio Cid
- Maria Rosaria Spanò
- Trezoro Huang Yinbao
- Fernando Maia Jr
- Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

En la junia numero de la revuo *Esperanto* aperas nur konciza versio de la raporto. Se vi deziras legi la plenan raporton pri la jaro, vi povas trovi ĝin en la retejo de UEA *https://uea.org/teko/komitato* kaj la papera versio peteblas de la Centra Oficejo laŭbezone.

## Enkonduko

Post la eventoplena 2017, kiun markis streĉoj financaj kaj administraj, la jaro 2018 metis la Asocion pli firme sur la vojon al ŝanĝo. Longe priparolita kotizreformo finfine ricevis Komitatan aprobon en la Universala Kongreso en Lisbono, kie krome kompletiĝis la elektado de tri novaj estraranoj. La financa situacio restis malfacila; post aprobo de la buĝeto por 2019, kun deficito de ĉ. 140 000 eŭroj, la Komitato instrukciis al la Estraro zorgi pri duonigo de la deficito en la posta jaro.

Ne mankis pozitivaj evoluoj sur diversaj agadkampoj. Relative granda Universala Kongreso en Lisbono estis la pinta aranĝo de la Jaro de la Esperanta Kulturo, kiun cetere markis ankaŭ rekorde granda partopreno en la Belartaj Konkursoj. La agado pri eksteraj rilatoj alportis plurajn sukcesojn, inkluzive de elokvente subtena letero de la nova Ĝenerala Direktoro de Unesko, sendita al la 103-a UK. La Seminarioj por Aktivula Maturigo atingis sian 53-an sesion en malpli ol kvin jaroj, kaj prosperis pluraj aliaj agadoj pri Kapabligo. Aro da regionaj renkontiĝoj kaj kongresoj atestis la daŭran viglecon de la movado en ĉiuj kontinentoj.

## Agadkampo 1: Konsciigo

Sub la gvido de la estraranoj E. Cid (informado) kaj S. Spanò (eksteraj rilatoj), daŭris la elano de la antaŭa jaro. Precipe ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN) la agado atingis rimarkindan nivelon, kvante kaj kvalite, dum kolektiĝis la unuaj centoj de Amikoj de Esperanto kaj nodiĝis kunlabora rilato kun Duolingo.

### Informado: promesplenaj paŝoj

Tra la jaro E. Cid okupiĝis pri redaktado kaj teknika riparado de la plurlingva informretejo ***esperanto.net***, kreante ankaŭ la dokumentojn *Instrukcioj pri ĝisdatigo de esperanto.net*, *Tradukoj de esperanto.net*, *Instrukcioj pri la mapo de esperanto.net*. Fine de la jaro la nombro de lingvoj kreskis ĝis 16, inkluzive de la angla, dana, franca, germana, hispana, itala, korea, nederlanda, persa, portugala, rumana, turka kaj araba. En tiuj lingvoj UEA kaj TEJO varbas por la nova senpaga aliĝkategorio Amikoj de Esperanto; ĝis la jarfino proksimume 600 homoj aliĝis per la retejo. En la nova portalo estas ankaŭ mondmapo kun Esperanto-asocioj, kiun oni ĝisdatigas laŭ kontribuoj de lokaj esperantistoj.

Nova iniciato estis formala kunlaboro kun la reta lingvolernejo **Duolingo** pri organizado de ĉeestaj eventoj por E-lernantoj. Cid kreis pri tio klarigan videon (*gazetaro.org/duolingo*), gvidis intervjuojn kun kandidatoj kaj helpis starigi 13 novajn Esperanto-grupojn en Duolingo. Por gvidi la agadon li preparis *Gvidlibron pri kunordigado de eventoj en Duolingo*.

Estis pluraj **alvokoj al informagadoj** tra la jaro. La grupo "Zorgantoj pri informado" dissendis informan tekston kaj alvokon por la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo (GK725), kiun reemfazis alvoko por la samtempa Semajno de Internacia Amikeco (GK728). Simile okazis kunlige kun la t.n. Esperanto-Tago, la 26-a de julio (GK741). Nekutima iniciato estis alvoko partopreni en EU-enketo pri multlingveco, "Publika konsulto – La uzo de lingvoj en EU-institucioj, oficejoj kaj agentejoj" (GK754), por kiu M. Fettes liveris konsilojn pri taŭgaj respondoj. Dissendiĝis ankaŭ alvoko por kunfestado de la Eŭropa Tago de Lingvoj, la 26-an de septembro (GK755). Por la 70-jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la 10-an de decembro, pretiĝis detala informilo kun rekomendoj pri eblaj agadoj (GK768).

Ne mankis valoraj **lokaj kaj fakaj iniciatoj**. Interalie, danke al donacoj de bonkoraj esperantistoj, la grupo "Ni semas" daŭrigis la pagatajn reklamojn per Facebook en Butano, Azerbajĝano, Jordanio, Meksiko kaj Paragvajo. UEA estis oficiala sponsoro de la 5-a Poliglota Renkontiĝo en Bratislavo, Slovakio (30 majo – 3 junio, 538 partoprenantoj el


Mark Fettes


Stefan MacGill


Aleks Kadar


Lee Jungkee

56 landoj), kie ĝin prezentis M. Grosjean kaj J. Meyer. La trian fojon okazis Esperanto-budo en la Multkultura Vilaĝo Polandrock, dank' al mondonaco kaj monkolekto organizita de UEA.

### Eksteraj rilatoj: ampleksa kunlaboro

Grava evoluo estis la elekto de UEA en marto al la **Estraro de CoNGO** (Konferenco de Neregistaraj Organizoj en Oficialaj Rilatoj kun UN-EKOSOK). La celo de CoNGO estas faciligi la partoprenon de NROj en la UN-sistemo kaj kunlabori kun UN por komunaj celoj, ekzemple la Celoj por Daŭripova Evoluigo.

La agado ĉe **UN en Novjorko** efektive konstante kreskas. AMO-seminario en januaro ĉe la sidejo de la Novjorka Oficejo estis kungvidita de H. Tonkin, S. Spanò, F. Maurelli (vicprezidanto de TEJO) kaj R. Maertens (komisiito de TEJO). Maurelli, Maertens kaj Spanò poste partoprenis la Junularan Forumon de EKOSOK (30–31 jan.). En majo la Studo-Grupo pri Lingvoj kaj UN organizis sian jaran simpozion; ĉefparolis d-ro M. Gazzola, kaj podie diskutis pluraj reprezentantoj de UN-departementoj kaj la ambasadoroj de Argentino, Belorusio, Gvajano kaj la Franclingvaj landoj. Ĉeestis 120 personoj el deko da landoj. En julio R. Maertens partoprenis la jaran Altnivelan Politikan Forumon pri Daŭripova Evoluigo. La 4-an de oktobro UEA sponsoris koncerton okaze de la 70-jariĝo de CoNGO kaj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (4-an de oktobro).

En **Ĝenevo** UEA estis reprezentita en la 11-a EMRIP (Fakula Mekanismo pri Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, 9–13 jul.), en la Ĝenevaj Prelegoj pri Paco (21 sep.), en renkontiĝo de reprezentantoj de NRO-j kun la Ĝenerala Direktoro de UN-Ĝenevo (30 okt.), kaj en la 11-a sesio de la Minoritata Forumo (29-30 nov.).

En **Parizo** temas pri la rilatoj de UEA kun **Unesko**. En la dua jaro de sia ekzisto, la *Unesko-kuriero* en Esperanto plu aperis sub la gvido de la ĉefredaktoro Huang Y. (Trezoro) kaj vicredaktoro A. Pechonkin (Rusio). Preskaŭ 70 tradukantoj kaj provlegantoj el trideko da landoj kontribuis al la revuo, kiun UEA eldonas kunlabore kun la E-Centro Ora Ponto (Ĉinio) kaj laŭ interkonsento kun Unesko. Aliaj evoluoj inkluzivas sonan version de la revuo, belan retejon (*kuriero.esperas.info*), kursojn en Koreio, Francio, Hispanio kaj Ĉinio, kaj efikajn retajn reklamojn kun pli ol 30 milionoj da trafoj. La ekzisto de la *Kuriero* sendube estis grava faktoro en la decido de la nova Ĝenerala Direktoro de Unesko, Audrey Azoulay, sendi longan kaj pozitivan salutmesaĝon al la 103-a UK en Lisbono. La mesaĝo estis poste tradukita al 21 lingvoj kunlabore kun la Informa Fako de UEA kaj aliaj aktivuloj (inter ili menciindas S. Keller kaj R. Corsetti). Ĉe la Unesko-sidejo mem en Parizo, delegitaro de UEA kaj TEJO (R. Triolle, F. Lo Jacomo, R. Maertens) partoprenis la Internacian NRO-konferencon (17–19 dec.).

Tra la jaro, okazis ampleksa **informado** pri la UN-agado, i.a. per la informilo de la Novjorka Oficejo, kiu raportas ankaŭ pri agado ĉe Unesko; la retejo *esperantoporun.org*, restrukturita de R. Hill; kaj entute 14 dulingvaj Gazetaraj Komunikoj (GK) pri 14 memortagoj (Holokaŭsta Memortago, Patrinlingva Tago, Virina Tago, Tago de la Familio, Tago de Rifuĝintoj, Amikeca Tago, Tago de la Paco, Tago de Turismo, Tago de Pli Aĝaj Personoj, Tago de Neperforto, UN-Tago, Tago de Toleremo, Tago de la Infano kaj Homrajta Tago). La komunikoj estis senditaj i.a. al EKOSOK kaj al la Fako pri Publika Informado (DPI) de UN-Novjorko. UEA estis krome reprezentita en diversaj aliaj internaciaj aranĝoj tra la jaro.

## Agadkampo 2: Kapabligo

En kunlaboro kun TEJO, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), la retejo *edukado.net* (K. Kováts), kaj aliaj aktivuloj, UEA (respondecaj estraranoj S. MacGill, M. Fettes, S. Spanò) celas kunordigi kaj stimuli instruadon kaj trejnadon tutmonde. Rimarkindas rekorda kongreso de ILEI en Madrido, pliviglîĝo de la universitata agado, kaj la atingo de la 53-a AMO-seminario.


Emilio Cid


Maria Rosaria Spanò


Trezoro Huang Yinbao


Fernando Maia Jr


Martin Schäffer




### Instruado: konstante frapante

Kun 256 aliĝoj el 33 landoj, la 51-a Kongreso de **ILEI** estis la plej granda ĝis nun. Elektiĝis nova estraro: prezidanto M. Grosjean, sekretario E. Nadikova, kasisto W. Harris kaj estraranoj R. Petrovic, I Colling, kaj du novuloj: K. Arakeljan kaj Y. Jung "Unika". Akceptiĝis ankaŭ du novaj sekcioj: Senegalo kaj Armenio. Fondiĝis laborgrupo por serĉi solvojn al la deficito de la Ligo, kaŭzita de ĝiaj du revuoj kaj troaj kostoj ĉe la kongresoj.

En 2018 la porinstruista retejo **edukado.net** (gvidas K. Kováts) superis 5000 membrojn: jarfine estis registritaj 5236 membroj el 133 landoj. La kresko kompare kun 2017 estis ĉ. 350 novaj membroj, ĉar dum la jaro, pro duoblaĵoj kaj forpasoj, perdiĝis kelkdeko da membroj. En la kolekto *Instrumaterialoj* estas entute: 875 lerniloj, 124 724 elŝutoj kaj 2702 komentoj. Tre populara parto de la retejo estas ankoraŭ la ludo RISKO (jarfine 1025 registritaj ludantoj). Signifa estas ankaŭ *Ekparolu!*, kiu en 2018 havis sian duan oficialan jaron. Al la programo aliĝis ĝis la jarfino 129 genevoj el 35 landoj; tra la jaro okazis 513 sesioj, iom malpli ol en la antaŭa jaro.

La **KER-ekzamenojn** plu gvidis K. Kováts kape de tripersona komisiono (kun R. Corsetti, Z. Kóródy). En ĉi tiu 11-a kalendara jaro de la ekzamenoj okazis entute 10 (9+1) memstaraj ekzamensesioj. La plusa sesio estis la 7-a tutmonda ekzamentago, dum kiu disvolviĝis ekzamenoj en 16 urboj de 10 landoj. En tiuj urboj ekzameniĝis entute 138 personoj kaj sukcesis 102. Antaŭe okazis apartaj sesioj en Greziljono (FR), Moskvo (RU) kaj Curitiba (BR), poste venis tiuj en Raleigh (US), Liptovský Mikuláš (SK), Lisbono (PT), Badajoz (ES), San-Marino (SM) kaj fine de la jaro en Puebla de Zaragoza (MX). Al la ekzamenoj dum la jaro aliĝis entute 268 personoj, el kiuj sukcesis 230 (86%). En Sud-Koreio kaj Brazilo sukcese ekzameniĝis po 28 personoj; sekvis Francio kun 25 sukcesintoj. Francio havas fine de 2018 entute 529 diplomitojn el la tutmonda sumo 2242.

### Universitatnivela agado: daŭrigo kaj kresko

UEA rolas kiel aŭspicianto kaj financa subtenanto de la **Speciala Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto** ĉe la Universitato de Amsterdamo. Post sukcesa donacvarba kampanjo en 2017–2018, la Prezidanto de UEA korespondis kun la kuratoraro de la katedro kaj redaktis kaj subskribis novan kvinjaran kontrakton (feb. 2019 – jan. 2024) kun la katedrulo, d-ro F. Gobbo.

La **Centro de Esploro kaj Dokumentado** (CED) kunlaborigas universitatajn kaj aliajn fakulojn pri lingvoj, lingvopolitiko kaj parencaj temoj, sub la gvido de la direktoro H. Tonkin. En la lastaj jaroj ĝi pli kaj pli proksime kunlaboras kun ESF (Esperantic Studies Foundation), kies subvenciado ebligas plurflankan laboron. Interalie, ESF financas la CED-Fonduson, kiu aljuĝis malgrandajn subvenciojn al fakuloj por specialaj projektoj (ĉeesto en konferencoj, aperigo de verkoj, biblioteka laboro k.s.); pri tio decidas komisiono el J. Jacobsen (Francio), V. Piskorec (Kroatio) kaj A. Tellier (Britio). En 2018 ESF financis ankaŭ la laboron de la Komisiito pri Terminologio de UEA, A. Gutiérrez (Kubo), kiu laboras en la kunteksto de CED.

Plu aperis **du gravaj periodaĵoj pri interlingvistiko** sub la aŭspicio de CED. ESF daŭrigis la aperigon de *Informilo por Interlingvistoj,* antaŭe redaktita de D. Blanke kaj nun sub redakto de H. Tonkin, Y. Amis kaj A. Tellier. La paralela anglalingva informilo, *Information for Interlinguists,* lanĉita en 2017, daŭre aperis tra la jaro. La revuo *Language Problems and Language Planning* aperis, kiel kutime, trifoje, jam en sia 42-a jaro kaj en kunlaboro kun la eldonejo John Benjamins, Amsterdamo. Ĉefredaktoro en 2018 estis T. Reagan (U. de Majno, Usono), sed jam eklaboris lia posteulo F. Grin (U. de Ĝenevo) pri la jarkolekto 2019, kun la helpo de nova vic-redaktoro, M. Gazzola (U. de Ulstero).

Pluraj evoluoj atestis plivigliĝon de la **agado en universitatoj**. En la UK en Lisbono okazis kiel kutime la Esperantologia Konferenco kaj la jarkunveno de CED; tuj post la kongreso, ESF kaj CED kunvokis t.n. Nitobe-simpozion, kun partopreno de kvindeko de universitataj instruistoj kaj esploristoj por diskuti siajn spertojn kaj defiojn kaj plani la estontecon. Ĝin organizis X. Alcalde. Kiel rekta sekvo, en oktobro 2018 ekfunkciis universitata laborgrupo kunlabore inter ESF, CED kaj ILEI, konsistanta el A. Tellier, R. Corsetti, V. Manzano-Arrondo, R. Petrović, E. Byelongo kaj Kimura G.C. Inter la prioritatoj de la laborgrupo: universitataj kursoj pri Esperanto aŭ interlingvistiko; registro de universitataj instruistoj kaj esploristoj; subteno de universitataj esploroj; E-konferencoj universitatnivelaj, unuavice la du okazontaj dum ILEI-kongresoj en 2019 kaj 2020; partopreno en neesperantistaj konferencoj kun ebla stipendio de ESF; lernolibro por universitataj kursoj.

### Aktivula trejnado: daŭre novaj terenoj

Tra 2018 okazis 12 Seminarioj por Aktivula Maturigo (AMO) en ĉiuj el la kvin mondregionoj de UEA. El tiuj 5 okazis en landoj novaj al la AMO-programo: Burundo, Maroko, Portugalio, Rumanio kaj Ukrainio. Signifa nova urbo por AMO estis Novjorko. Unuafoje la UK gastigis AMO-seminarion – temis

pri la 50-a seminario en Lisbono. Sume okazis 53 seminarioj depost marto 2014. Por la unua fojo okazis en Afriko du grandparte samtempaj seminarioj, tiuj en Marakeŝo (Maroko) kaj Nyanza-Lac (Burundo). Tio atestas, kiom UEA strebas transformi sian profilon en tiu kontinento. Laŭ la kutimo, aperis en la januara numero de la revuo *Esperanto* resumo pri la seminarioj de 2018; pliaj informoj haveblas per la UEA-vikio (*uea.org/vikio/Kategorio:Aktivula_Maturigo*) kaj la retejo *aktivulo.net*.

## Agadkampo 3: Komunumo

La Jaro de la Esperanta Kulturo vidis interalie unu el la plej grandaj Universalaj Kongresoj de la lastaj jaroj, rekordan partoprenon en la Belartaj Konkursoj kaj aron da sukcesaj regionaj aranĝoj. Ĉiuj estraranoj ludis rolon ĉi-kampe, kaj aparte bonvena estis la elektiĝo de F. Maia en Lisbono, kiu energie transprenis respondecon pri kulturo, kongresoj kaj Afriko. Tio permesis al Lee J-k. ekgvidi la fakan kaj sciencan agadon, antaŭe en la manoj de la Prezidanto.

### 103-a Universala Kongreso, Lisbono, Portugalio

Al la 103-a UK (28 jul. – 4 aŭg.) aliĝis 1567 kongresanoj el 73 landoj. La kongresejo, ĉe la jura fakultato de la Universitato de Lisbono, proponis taŭgajn salonojn kaj malmultekostajn manĝojn; la klimatizado tamen ne ĉiam sufiĉis por certigi komforton. En la Inaŭguro, grandan impreson faris la salutmesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko kaj la alparolo de d-ino Margaret Zamenhof, pranepino de la aŭtoro de Esperanto. La kongresa temo, "Kulturo, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?", estis traktita tra la semajno en kvar diversaj sesioj kun abunda partopreno (reĝisoris X. Alcalde). La Movada Foiro, Internacia Kongresa Universitato, lingvokursoj, KER-ekzamenoj, fakaj kunsidoj, Nacia kaj Internacia Vesperoj, Kleriga Lundo kaj la Tago de Lernado – ĉiuj faris sian kutiman kontribuon al la vigleco kaj bunteco de la programo.

La Jaro de la Esperanta Kulturo atingis sian kulminon en Lisbono per pluraj specialaj programeroj: la 100-jara jubileo de la traduko de *Sinjoro Tadeo* fare de Antoni Grabowski (menciinde ankaŭ pro la sukcesaj kontaktoj kun la pola ambasadejo en Lisbono); omaĝo al Marjorie Boulton; la Junulara Konkurso pri Publika Parolado, renovigita formo de la iama Oratora Konkurso; speciala faka kunsido pri E-bibliotekoj; sesio pri Esperanto-kulturo kaj aparte pri E-teatro dum la Kleriga Lundo. La novstila teatreca premiceremonio de la Belartaj Konkursoj, reĝisorita de la prezidanto M. Fernández kaj sekretario M. Gutiérrez Adúriz, i.a. konfirmis ke alvenis la plej granda nombro da konkursaĵoj (135 entute) en la lastaj 30 jaroj; precipe la nova branĉo Mikronovelo montriĝis granda sukceso, kun 38 verkoj.

En la UK estis krome anoncitaj la premioj de **Fondaĵo Antoni Grabowski** por 2018. La unuan premion ricevis Sten Johansson (Svedio) pro sia elstara literatura kontribuo (traduka kaj originala); la duan ricevis Gonçalo Neves (Portugalio) kaj Bernhard Pabst (Germanio) pro sia komune kompilita *Historia vortaro de Esperanto 1887–1889*.

### Landa kaj regiona agado: gajnoj kaj perdoj

La nombro de **aliĝintaj landaj asocioj** en UEA restis 72 fine de 2018: 8 en Afriko, 12 en Ameriko, 14 en Azio-Oceanio, 38 en Eŭropo. Ekzistas kelkaj landoj kun organizita movado, kie oni povus pripensi aliĝon – ekzemple, Turkio, Tanzanio, Timoro; apartan mencion meritas Uzbekio, kie Uzbekia Esperanto-Asocio estis fondita julie kaj registrita ĉe la Ministerio de Justico. Aliflanke, pluraj el la ekzistantaj asocioj riskas malaligon pro nereagemo kaj membromanko. Relative altas la proporcio de asocioj, kiuj ne reagas al alvokoj. Oni antaŭvidu iom da aktualigoj en 2019–2020.

**Landaj kaj regionaj kongresoj** en 2018 inkluzivis plurajn rimarkindajn eventojn: la 9-a Tut-Amerika Kongreso (TAKE, 11–17 feb. en Havano, Kubo; 232 homoj el 20 landoj); la 2-a Trilanda Kongreso (28 mar. – 2 apr. en Bekasi, Indonezio; 66 homoj el 8 landoj); la 11-a Mezorienta Kunveno (31 mar. – 2 apr., Marakeŝo, Maroko; 30-40 homoj el deko da landoj); la 1-a Kunveno de Sudorient-Azia Junularo (27–29 apr. en Ayutthaya, Tajlando); la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK, 3–12 jul., Raleigh, Sud-Karolinio; pli ol 80 studentoj kaj instruistoj); la 12-a Somera E-Studado (14–22 jul. en Liptovský Mikuláš, Slovakio; 222 homoj el 30 landoj, inkluzive de 95 TEJO-aĝuloj); la 1-a Afrika Kongreso de Virinoj (AKVo, 21–28 sep., Moramanga, Madagaskaro; 38 aliĝintoj); la 2-a Komuna Kongreso de Japanio kaj Koreio (12–14 okt. en Nara, Japanio; 422 ĉeestantoj kaj 121 subtenantoj el 14 landoj: Barata Esperanto-Kongreso (15–16 dec. en Puneo, Maharaŝtro).

La estrarano MacGill pretigis unike ampleksan **regionan kaj landan super-**




Somera Esperanto-Studado Malfermo

Kelkaj vizaĝoj de Scienca Kafejo







**rigardon** sub la nomo GAMO (Gvidilo por Aktivuloj Movadaj), responde al komisio de la Komitato. La projekto inkluzivas informojn pri la agado kaj stato de la movado en la diversaj mondopartoj, kune kun bazaj kaj influaj statistikoj pri ĉiu unuopa lando (areo, popolo, denseco, ekonomia forto ks). La raportoj elŝuteblas ĉe *uea.org/asocio/gvidilo*. La prezento celas, ke agantoj en niaj landoj kaj regionoj havu klaran informan bazon, el kiu pli sencohave ili formu siajn agadplanojn.

### Faka, scienca, kultura agado: disa vigleco

Inter la ses aliĝintaj **fakaj asocioj** (blinduloj LIBE, komercistoj IKEF, instruistoj ILEI, fervojistoj IFEF, medicinistoj UMEA, sciencistoj ISAE), tri



Prelego dum ILEI-kongreso

organizis propran kongreson en 2018: IFEF en Vroclavo, Pollando (19–25 majo), LIBE en Zagrebo, Kroatio (7–14 julio), ILEI en Madrido, Hispanio (20–28 julio). La aliaj tri kunvenis dum la UK en Lisbono, kaj cetere organizis sian laboron rete: IKEF (*ikef-esperanto.net*), UMEA (*umea.fontoj.net*) kaj ISAE (*www.scienca-asocio.com*). Post la UK en Lisbono, la fakan kaj sciencan agadon transprenis Lee J-k., kiu dissendis enketilon al ĉiuj aliĝintaj kaj kunlaborantaj fakaj asocioj. Liaj esploroj kondukis al ĝisdatigo de informoj ĉe multaj asocioj, kaj al preparoj por la fondo de nova asocio de te-amantoj.

La ĉefaj **sciencaj aranĝoj** de la jaro konsistis el la Internacia Kongresa Universitato kaj Scienca Kafejo kadre de UK; la 35-a Sanmarineca Universitata Sesio de AIS San-Marino, kunlige kun la Itala kongreso en San-Marino (18–25 aŭgusto); kaj KAEST (Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko; 18–21 okt. en Modra, Slovakio), kun 76 aliĝintoj kaj abunda diverstema programo.

Post rezigno de la ĝisnuna komisiito pri **Ĝemelaj Urboj**, s-ro Wu Guojiang, post pluraj diskutoj la Estraro nomumis kiel novan komisiiton R. Coquisart el Francio (jam komisiito pri ĜU nome de Espéranto-France). Ŝi kunlaboras kun la antaŭa komisiito kaj aliaj agantoj tiukampe.

La estraranoj Maia kaj Spanò kunlaboris pri la disdono de subvencioj de la **Biblioteka Apogo Bachrich**, kies celo estas subteni kaj pliriĉigi E-librokolektojn tra la mondo. Dek kvin bibliotekoj ricevis subvencion en 2018, en Belgio, Benino, Brazilo, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Rusio kaj Ugando. La subvencioj estas uzeblaj por akiri librojn aŭ aliajn varojn aĉeteblajn ĉe la Libroservo de UEA.

## Agadkampo 4: Kunordigo

Malgraŭ daŭraj financaj defioj, la jaro fruktis per reformo de la kotizsistemo, stabiligo de la membraro, kreskigo de donacoj kaj plifortigo de la Estraro. Al tio kontribuis ĉiuj estraranoj, sed aparte menciindas la laboroj de Fettes, MacGill, Kadar kaj Maia por flegi la membraron.

### Oficejo, Estraro, Komitato

En la Centra Oficejo laboris M. Schäffer (Ĝenerala Direktoro), C. Magalhães (Kongresa Fako), K. Marciniak (sekretariado), I. Oneț (Libroservo), R. Schmeits (kontado, biblioteko), S. Starčević (kontado) kaj L. Silva Miranda (purigado). La dungitaj laborfortoj sumiĝis je 5,77 plentempuloj, malalta kvanto kompare kun antaŭaj jaroj. Menciindas, ke Schäffer kaj Schmeits nur parte laboris en Roterdamo, sed per reto kaj telefono la kunlaboro bone funkciis. Volontule laboris Pasquale Zapelli (datumbazo, administra konsilanto, financoj), R. Moerbeek (provlegado, biblioteko, voĉlegado), Francisco Veuthey (Dua Bulteno, UEA Viva), N. Enache (EVS-volontulo ĝis septembro) kaj A. Grigorjevskij (retejoj). Aldoniĝas la TEJO-kunlaborantoj kaj volontuloj, kiuj aperas en la TEJO-raporto.

De februaro ĝis aprilo la gvidanto de la reteja/administra renovigo, A. Ribeiro, laboris en Roterdamo. La nova datumbazo tamen ne pretiĝis ĝustatempe por ekuzo antaŭ la UK en Lisbono, kaj poste la laboro haltis, tiel ke la Estraro estis devigita serĉi novan solvon kunlabore kun TEJO. Pri *aktivulo.net* kaj *revuoesperanto.org* zorgis A. Striganova kaj D. Ŝevĉenko (Rusio). La retpaĝon *esperanto.net* prizorgis la estrarano E. Cid. Ekster la oficejo krome helpis Adjévi Adjé. Krome la Estraro transprenis diversajn, ankaŭ administrajn taskojn.

Al la Estraro elektita en Nitro (M. Fettes, prezidanto; S. MacGill, vicprezidanto; Lee J-k., M.R. Spanò kaj E. Cid); aldoniĝis per reta voĉdono A. Kadar (Ĝenerala Sekretario), Trezoro Huang Y. kaj F. Maia (Afriko, Kulturo, Kongresoj). La kunlaboro en la Estraro estis harmonia kaj konstanta, kun skajpa kunsido ĉiun duan semajnon kaj ĉeestaj kunsidoj en Roterdamo (aprilo) kaj Lisbono (julio). Tra la jaro dissendiĝis 25 EKO-komunikoj kaj 55 Gazetaraj Komunikoj.

La Komitato kunvenis en Lisbono dum dek horoj en la pleno kaj en la kutimaj kvar Komitataj Forumoj pri la

ĉefaj agadkampoj. Temis pri tre aktiva kunveno, kun pli ol 20 voĉdonoj. La plej granda temo estis ŝanĝo de la kotizsistemo, i.a. por havi membro-kategorion kiu ricevas nur retajn servojn (nun Baza Membro, MB) kaj por ligi la kotizojn pli sisteme al la relativa riĉeco de la koncerna lando (nun ekzistas kvin lando-kategorioj, inter kiuj Kat. 1 pagas nur 2 eŭrojn por baza membreco). Krome unuafoje enkondukiĝis rabatoj por junaj membroj. Alia grava temo estis la financa situacio: en 2017 la deficito atingis preskaŭ 160 000 EUR, kaj la buĝeto por 2019 prognozas plian negativan saldon de pli ol 140 000 EUR. La Komitato aprobis la buĝeton, tamen instrukciante al la Estraro, ke la buĝeta deficito en 2020 estu maksimume la duono de la deficito en 2019, en 2021 maksimume 50 000 EUR, kaj ke averaĝe en la periodo 2022-2024 estu ekvilibro.


### Membraro, financoj, servoj

En 2018 UEA havis 4581 individuajn membrojn (IM), t.e. 80 pli ol en 2017. Parton de la kresko kaŭzis relative granda UK en Lisbono. Daŭris ŝrumpado ĉe la grava membrokategorio MA. Plej multe da IM liveris Germanio (452), Francio (484), Brazilo (353), Japanio (324). La tuta UEA-membraro (AM + IM) estis sume 13 106 membroj (+35). El ĉiuj IM de UEA, 549 estis junaj (+44). En Lisbono elektiĝis tri novaj honoraj membroj: Josep Franquesa Sole (Hispanio), Rafaela Urueña de Hernández (Hispanio) kaj Nan Youli (Ĉinio); krome du novaj membroj de la Honora Patrona Komitato, la EU-komisionano pri sano Vytenis Andriukaitis kaj mondfama la ŝakisto Judit Polgár.

La buĝeto por 2018 antaŭvidis deficiton de preskaŭ €140 000, sed la fina rezulto estis signife pli bona, kun negativa saldo ĉirkaŭ €100 000. La plej granda ŝparo okazis ĉe la oficistaro, dum la plej granda pluso ĉe la enspezoj venis de la relative granda UK (kotizprocentaĵo). Malgraŭ haltigo de la falo en la membronombro, denove malkresketis la sumo pro kotizoj; aliflanke, energia donacvarbado alportis sume pli ol €12 500 al la Ĝenerala Kaso. Ankaŭ subvencioj de Fondaĵo Hodler kaj ESF helpis altigi la enspezojn de la Asocio. La deficito tamen restas tre granda, kaj strukturaj problemoj daŭras, ĉar la buĝeto por 2019 denove antaŭvidas deficiton de ĉ. €140 000. (Vidu pri tio la diskutojn de la Komitato en Lisbono.)

**Financoj / Grava informo!**

La financa raporto kun la rezulto de la spezokonto / bilanco aperos en la venonta numero de la Revuo *Esperanto*. Samtempe ĝi aperos en la teko: *https://uea.org/teko*. Jam nun tamen eblas diri, ke la deficito estas malpli alta ol buĝetite. Supozeble la deficito estos ĉirkaŭ 105 000 EUR.




*Movadaj Insuletoj*, de H. Goes

La oficiala organo de UEA, **la revuo Esperanto**, aperis akurate kaj en bela vesto sub la redakta prizorgo de D. Ŝevĉenko kaj A. Striganova. Feliĉiga evoluo estis la restarigo de la **voĉlegado de la revuo**, dank' al la interveno de la estrarano E. Cid, kiu sukcesis varbi pli ol 50 volontulojn por tiu laboro. De la **revuo Kontakto** aperis 6 numeroj sur entute 144 paĝoj (inkluzive la kovrilajn kaj la movadan rubrikon *TEJO Tutmonde*). La tutan jarkolekton redaktis R. Pavinski. **Jarlibro 2018** aperis en julio, kun 1296 delegitoj en 100 landoj: 50 ĉefdelegitoj, 729 lokaj, 81 vic-, 25 junularaj kaj 978 fakaj delegitoj (kun okcento da fakoj). Redaktis P. Fischer-Kotowski, antaŭparolis S. MacGill.

La **Libroservo**, prizorgita de I. Oneț, vendis por iom malpli ol €80 000 en 2018 – pli bona rezulto ol en 2017, sed je €12 000 malpli ol buĝetite, malgraŭ relative granda kongreso. UEA eldonis la aktojn de la 71-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (red. A. Wandel, 189 p.) kaj detalan, faktoriĉan historion de Esperanto en Indonezio, *Movadaj Insuletoj*, de H. Goes. Kadre de la Serio Oriento-Okcidento aperis *Sieĝata fortikaĵo* de Qian Zhongshu (tradukis Wei Yida, eldonis Ĉina Fremdlingva Eldonejo), *La strangaĵoj de Liaozhai* de Pu Songling (tradukis Guozhu, eldonis Zaozhuang-a Universitato kunlabore kun Impeto) kaj *La ponto super Drino* de Ivo Andrić (tradukis Ljiljana Sekelj Milenković, eldonis Dokumenta Esperanto-Centro).



En la libroservo